**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

N-ro 12/77 - 21 mar 1977

Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



## "La Espero" el Korea Respubliko

**Nürnberg (pp) - En nia leterkesto ni ĵus trovis sendaĵon de Korea Ambasado en Bonn (adreso: Koreanische Botschaft, Presse- und Kulturabteilung, Adenauerallee 124, D-5300 Bonn). Kun scivolo ni malfermis la koverton kaj trovis....bele presitan koloran Esperanto-revuon kun la nomo "La Espero", Leĝe registrita sendependa monata Esperanto-gazeto, n-ro 1, gratula numero, novembro 1976. Estis vere granda surprizo!**

EL REDAKCIO


"La ESPERO" estas internacia informilo pri la kampoj kulturaj, sociaj, religiaj kaj aliaj tra la tuta mondo. Ĝi celas diskonigi la fakton de Koreujo kaj peradi interŝanĝon de kulturscio inter nacioj surmondaj, per la internacia lingvo Esperanto. Nun ĉe la internacia epoko, ni ĉiuj homoj plejofte frontas al la aferoj rilatantaj kun aliaj nacioj. Kaj por plia kompreniĝo pri respektivaj nacioj estas necese posedi iom da scio pri la kulturo, socio kaj aliaj de tiu responda nacio. La mondo, kvankam sur kiu daŭras konfliktoj, konkurencoj, militoj, ĉiam direktiĝas al la paco tra la historio. En tiu senco, "La ESPERO" fondiĝis kun la intenco ligi la homaron en unu kadron fratecan, kiel flustras nia kanto "La ESPERO". Ni, la redaktoroj, deziras koncentrigi niajn plejajn fortojn por efektivigi la nehalteblan aspiron de la homaro, en la lando, kie loĝas pacamantaj popoloj jam spertitaj de suferoj kontraŭpacaj. "La ESPERO" por ĉiam estos ĉe ĉiuj pacamaj amikoj sur la mondo, kun la varma subtenado kaj amika kunlaborado de ĉiuj legantoj. Sendante elkoran saluton al la legantoj, la redakcio atendas la konsilojn, admonojn kaj opiniojn por la venontaj numeroj.



Redaktoro: Eil Paul K. KIM

*LA ESPERO*

*sur ĉiu numero*
*enhavas jenajn:*



Ĉefartikolo.
legantoj skribas.
Novaĵoj tra la mondo.
kia la lando?
Fotoj de "La ESPERO".
KOREUJO: hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ.
EL korea Literaturo.
kaj aliaj utilaj···

*La sekvanta numero aperos en la 25-a de novembro.*
*---Redakcio---------*

## AL LA LEGANTOJ

Al la legantoj.

Vi estas petata informi al la redakcio de "La ESPERO" pri via ricevo de tiu ĉi numero. Via respondo multe helpos la administradon. Antaŭdankon!!!

Ĉu vi deziras partopreni al "La ESPERO"?

Se jes, ankaŭ vi povas kontribui por "La ESPERO". "La ESPERO" volontas akcepti de ĉiuj legantoj ĉian ajn kontribuaĵon por pli-enhavoriĉaj venontaj numeroj. Vi tamen atentu, ke aperigi vian kontribuaĵon estas kompreneble tute laŭ dispono de la redakcio.

Daŭrigo sur p. 2.

La Espero......

Recenzon de tiu ĉi nova revuo el Azio ni publikigos en la venonta numero de PP. Sed supraĵa rigardo super la revuon eble jam permesas nun la konstaton, ke kun ĉi tiu gazeto okazas renesanco de la interna ideo de Esperanto.

La abonkotizo estas 5 US-dolaroj aŭ egalvaloro. Adreso: La Espero, C.P.O.Kesto 2752, Seoul 100, Suda Koreujo.

Scienca Mondo

Atingis nin ankaŭ la 1-a numero de "Scienca Mondo", organo de Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj. El cirkulero de la ĉefredaktoro de la Esperanta eldono, prof. Vasil Peevski, ni citas:
"Ekde 1976 j. Tutmonda Federacio de Sciencaj Laboristoj aperigas sian organon "Scienca Mondo", krom en franca, angla, germana kaj rusa, ankaŭ en Esperanto, 4-foje jare, ĉiu libreto kun 32 paĝoj.
La Tutmonda Federacio de Sciencaj Laboristoj estas aŭtoritata internacia organizaĵoj havanta statuton "A" en UNESKO kaj pli ol 300 000 membroj en la tuta mondo. Jen kial la aperigo de "Scienca Mondo" en Esperanto estas ekskluzive granda sukceso por la Esperanto-movado.
Tiu ĉi iniciato devas esti subtenata de ĉiuj Esperanto-redakcioj, Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj esperantistoj."

La jarabono por 4 numeroj estas 2 Usonaj dolaroj. Oni abonu ĉe: Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario, Redakcio de "Scienca Mondo", bul. Tolbuhin 18, Sofia 1000, Bulgario. Bankkonto: Bulgara Eksterlanda Banko, Sofia, n-ro 463-029-3006.

Pri El Popola Ĉinio

Aperis nun la januara numero de El Popola Ĉinio. Kaj verŝajne nun la revuo denove regule aperas. En ĉi tiu numero estas noto al la legantoj: "Karaj legantoj: Pro certa kaŭzo la 11-a kaj 12-a n-roj 1976 de nia gazeto estas prokrastitaj kaj eldonotaj duope. Tion ĉi sciigante al vi ni sendas al vi ALTAJN SALUTOJN! Redakcio de EL POPOLA ĈINIO"

***************

Pri la IKUE-Kongreso en Ĉenstoĥova

Vatikan-Urbo (pp) - Kadre de intervjuo, kiun faris s-ro Bruno Valentini kun P. Biedulski, prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kaj kiu estis disaŭdigita de Radio Vatikana, ni eksciis kelkajn interesajn detalojn pri la IKUE-kongreso en Ĉenstoĥova de la 17-a ĝis 21-a de aŭgusto 1977:

La Loka Kongresa Komitato jam multe laboras kaj zorgas antaŭ ĉio pri loĝlokoj, artaj vesperoj kaj pri oficialaj dum- kaj postkongresaj aranĝoj, ekz. ekspozicioj, renkontiĝoj, vizitoj kaj ekskursoj.

Kun ĝojo P. Czestaw Biedulski povis konstati la favoran kaj helpan sintenon de registaraj instancoj en Varsovio kaj Ĉenstoĥova. Li anoncis ke la alta protektanto de la IKUE-kongreso estas Lia Eminenta Moŝto, Karolo, Kardinalo Wojtyla, Krakovo, kiu celebros inaŭguran meson, la 18-an de aŭgusto kune kun 4 episkopoj kaj almenaŭ 30-o da pastroj el diversaj landoj.

Pri la celoj de la kongreso P. Biedulski diris: Unue ni volas pridiskuti aŭ almenaŭ tuŝi la temon de la 37-a IKUE-Kongreso: Kiu estas la rolo de Esperanto en evangelizado kaj progreso de homa persono?
Due, la estraro de IKUE deziras proponi novan revizion de la IKUE-statuto. Trie, La organizantoj de la kongreso deziras montri al la internacia esperantistaro iom da pola historio, lando kaj kulturo.
Ĝis la 31-a de januaro aliĝis 220 personoj el 15 landoj, oni atendas 500 - 600 partoprenantojn.

daŭrigo sur p. 3

IKUE-kongreso...

Okaze de vizito de P. Biedulski ĉe d-ro J. Kondor antaŭ kelkaj tagoj, li bedaŭris ke ĝis nun nur malmultaj germanoj aliĝis al la kongreso. Li alvokas la katolikajn esperantistojn en F R Germanio amase aliĝi al la IKUE-kongreso. Adreso: IKUE, Via Berni 9, Roma.

Ni ankaŭ memorigas pri la belaj glumarkoj de la kongreso. Ili estas haveblaj ankaŭ ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Postscheckkonto 819 56-851. 1 folio kun 20 glumarkoj kostas 2,- GM inkl. afranko.

Invito al seminario por kursgvidantoj

Augsburg (pp) - Kadre de la kunveno de la Bavara Esperanto-Ligo en Schwabmünchen, de la 23-a kaj 24-a de aprilo 1977, okazos seminario por Esperanto-instruistoj kaj kursgvidantoj pri la temo: Metodiko de la Esperanto-Instruado, dimanĉe, la 24-an de aprilo, je 10,30 horo. La seminarion organizas la fakestro pri ekzamenoj de la Germana Esperanto-Instituto, Gerald Tucker, Trettachstr. 34, D-8900 Augsburg. Interesuloj sin turnu rekte al li!

Okaze de la Esperanto-kunveno estos aranĝata Esperanto-ekspozicio en la lernejo de Schwabmünchen kun provlecionoj.

Eŭropa Esperanto-Kongreso

Paderborn (pp) - Ni atentigas denove pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Paderborn, de la 27-a ĝis 31-a de majo 1977. La kongreskotizoj estas:

| | |
|---|---|
| Kongresan(in)o | 25,-- GM |
| Edz(in)o | 15,-- GM |
| Studento aŭ lernanto | 10,-- GM |
| Infano ĝis 15 jaroj | 5,-- GM |

Petu aliĝilon de la LKK

D-ro Hans Kasselmann
Falkenweg 10
D-4790 Paderborn

Kadre de la Eŭropa Esperanto-Kongreso okazos la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio. La membroj de GEA devas fari gravajn decidojn!

Kiu fariĝu prezidanto de Germana Esperanto-Asocio? D-ro Werner Bormann, la ĝisnuna prezidanto, ne plu pretas kandidati por tiu funkcio. Kaj tio ŝajnas esti prudenta decido, ĉar li ja estas troŝarĝita per aliaj gravaj funkcioj, kiujn li preferas kaj volas pliintensigi. GEA do devas respekti lian decidon. Necesas do trovi alian taŭgan kandidaton, kiu pretas dediĉi grandan parton de sia libertempo al la bonfarto kaj progreso de Germana Esperanto-Asocio. La ligoj, fakaj organizoj, lokaj grupoj kaj aktivuloj jam nun pripensu kaj diskutu tiun situacion. Kaj kandidatoj mem estas vokataj sin prezenti por elekto!

Alia grava demando estas la asocia organo. Ĉu la internacia revuo "Esperanto" estas la plej oportuna kaj taŭga revuo por la membroj de Germana Esperanto-Asocio. Ankaŭ pri tio la membroj de GEA devas decidi!

Aliĝu do al la Eŭropa Esperanto-Kongreso!

********************

Esperanto-filmo en Triestaj lernejoj

Triesto (pp) - La islanda filmo "Tero el maro" atingis Trieston kaj Triesta Esperanto-Asocio proponis al la estroj de mezgradaj lernejoj ĝin prezenti al la lernantaro. La propono estis akceptita.
La filmo vekis grandan intereson kaj inter la gejunuloj kaj inter la geinstruistoj. Pluraj ĉeestantoj petis informon pri Esperanto. Kadre de la Semajno de Internacia Amikeco TEA organizis por la lernantoj konkurson. Per medaloj kaj pri-Esperantaj libroj estas premiataj la tri plej trafaj liberaj taskoj pri la temo "La Internacia Amikeco".

Broŝuro pri Česká Třebová

Esperanto-grupo "Amikeco" en urbo Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio, sendos al ĉiu interesulo belan, riĉenhavan, ilustritan 24-paĝan broŝuron pri la urbo Česká Třebová kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, senpage! Por afrankokostoj oni aldonu du internaciajn respondkuponojn aŭ validajn poŝtmarkojn. Ne mendu la broŝuron amase!

Adreso: Jiří Pištora, nám. Míru 1746, CS-560 02 Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio

Paskaj kursoj de GEJ

Restas ankoraŭ kelkaj liberaj lokoj en la internaciaj intensaj kursoj de GEJ, okazontaj de 9-a ĝis la 15-a de aprilo 1977 en Cuxhaven. Interesuloj tuj aliĝu ĉe Klaus Schubert, Duvenstedter Triftweg 26 c, D-2000 Hamburg 65 kaj antaŭpagu 10 GM al pĉk Karlsruhe 545 77 - 754 por Germana Esperanto-Junularo, Hindenburgufer 80/81, D-2300 Kiel 1. Certas, ke instruos Franz Kruse, Rossdorf, prezidanto de GEJ, Paŭlo Ereno el Roterdamo kaj Stefan McGill, novzelandano, estrarano de TEJO, volontulservanto en la CO de UEA. La partoprenantoj loĝos en kvarlitaj ĉambroj en junulardomo, situanta rekte malantaŭ la digo de la Norda Maro. Partoprenantoj ne pli ol 25-jaraj ricevos vojaĝsubvencion!

Grava informo de Svisa Radio

Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-fako, sciigas:

Ni atentigas vin jam nun ke ekde la 2-a de majo 1977 la radio-elsendo en Esperanto, kiu okazas nun je 13,20 - 13,30 estos transmetita al 19,00 - 19,20 horo. La tagoj kaj frekvencoj restas la samaj.

La redakcioj de Esperanto-elsendoj estas petataj ĝustatempe meti tiun indikon en la horaron de la Esperanto-elsendoj.

Reagoj - opinioj

Dr. J. Kondor pri Esperanto-elsendoj

Pri IBRA kaj ORF: La mardan elsendon de IBRA kaj la ĵaŭdan elsendon de ORF mi ne povas trovi, kvankam mi volonte aŭskultus ambaŭ. (Noto de Pilo-Press: Ambaŭ elsendoj estas bone aŭdeblaj en Nürnberg!) Feliĉe estas, ke lastatempe ORF estas sufiĉe bone, sen konfuzoj aŭdebla sur la 49 m ondolongo, sabate kaj dimanĉe! Radion Vatikanan mi kaptas ĝis nun ĉiam eminente! Polan Radion mi aŭdas vespere pli bone ol matene, sed ankaŭ matene estas bone komprenebla Pola Radio, precipe post kelkaj minutoj, kiam la aparato estas sufiĉe "varma"... Foje-foje Pekinon mi kaptas sufiĉe bone.... Kiam s-ro P. Biedulski ĉe mi estis, dimanĉe vespere, antaŭ la programo de Radio Vatikana mi reaŭskultis kune kun li la antaŭsemajnan programon, kie li salutis min en la leterkesto kaj ĝoje konstatis, ke lia voĉo kaj entute la kompleta programo de Radio Vatikana tiel bonege estas aŭdebla en Germanujo.

Ernst Höpfler, Lippstadt: "Mi ĉiam ĝojas, ke via nomo estas daŭre citata de la diversaj radiostacioj kaj ke via laboro por Esperanto estas tiel aprecata kiel ĝi meritas ĝin.

ORF-Mallongonda Servo en sia leterkesto de la 12/13 de marto konfirmis la ricevon de "la ŝerca-satira "Bervala Kuriero".

Pola Radio kadre de la Esperanto-anguleto en la germana programo, dimanĉe la 13-an de marto mallonge recenzis la "Bervalan Kurieron" kaj citis el ĝi du kontribuaĵojn, inter ili la respondon de"Bervala Radio" pri la "bervalaj rajtoj".

**************************

PILO-PRESS, ĉiusemajna internacia informilo: JARA ABONO 30,- GM, pagebla al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg , Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851